50a Jaro — N-ro 6 — Novembro - Decembro 1958a

# BELGA ESPERANTISTO

Oficiala dumonata Organo de

**REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA**

Asocio sen profita celo,

aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro-Administranto :
la Prezidanto de R.B.L.E. :
**Maur. JAUMOTTE**
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Fondita en 1908a

★

Abonprezo : Fr. 100,-

Firma Van Iseghem & Verstraeten,
P.V.B.A.
St Bernardse Steenweg, 631 Hoboken
vitraloj - speguloj - „Securit" vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj stangoj por kupoloj
vitro-cemento por tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefoon 37.88.20

kaŭ plenigis la tutan programon. Organizo de « Paroliga Kurso » estis decidata kiun gvidas S-ro Luc De Marré ĉiun vendredon dum duono da horo antaŭ la komenco de la kunsido.

La 12an, angla samideano S-ro L. Horsky, en tre flua, bonstila Esperanto, paroladis pri la vivo de « Rembrandt » kaj montris belegajn, kolorigitajn diapozitivojn pri la ĉefverkoj de tiu granda pentristo. Per varmaj kaj trafaj vortoj la Prezidanto S-ro M. Jaumotte dankis.

Lundon, la 15an elementa kurso komenciĝis en la lernejo de Belgiëlei kaj kiun gvidas S-ro L. De Marré. Enskribiĝis 15 personoj. S-ro M. Jaumotte faris la tradician enkondukan paroladon.

La 19an, Hispanaj gastoj, S-ro Moleira kun edzino, vizitis la grupon kaj parolis pri « Hispanujo, lando de Don Kihoto ». En tre bona, belsona Esperanto la paroladisto klarigis la diversajn aspektojn de la socia vivo en sia lando kaj tion ilustris per amuzaj anekdotoj kaj ekzemploj. La duan parton de la vespero (3a serio de « Tra la Mondo »: Svisujo) partoprenis F-ino M. Hofkens, S-roj L. De Marré kaj R. Van Eynde, kiuj ilustris siajn paroladetojn per belaj lumbildoj.

La 29an, la unua kabareta vespero de la sezono estis prezentata. Kunlaboris kiel gasto: Fraŭlo Eddy Bogaerts, kiu majstre manipulas la harmonikon. F-ino Yv. Cools, S-roj P. Flament kaj F. Schellekens bonege interpretis la diversajn rolojn en la skeĉoj kaj S-ro H. De Roover kun edzino Paula kaj filo Paul lerte prezentis gantpupan teatraĵon de li verkitan. Ili konstruis mem la instalaĵon, tiel ke ĝi estas facile malmuntebla. S-ro J. Verstraeten enkondukis la tuton kaj flegis la reĝion. S-ro F. Schellekens prizorgis la dekorojn kaj S-ro A. Van Dessel respondecis por la lumarangôj.

La 3an de oktobro, S-ro R. Balleux paroladis pri sia vojaĝo al « Hispanujo ». Per amaso da lumbildoj li skizis siajn travivaĵojn, substrekante la tipe hispanajn aferojn: festojn, la multajn loteriojn, la vagonarojn, k.t.p. Dum la dua parto de la vespero, F-ino A. Enzlin montris kolorfilmon memverkitan pri sia vojaĝo al Hispanujo kaj la Nord-Afrika marbordo. Ŝi bone ĝin komentariis.

La 10an, la du fratinoj H. kaj M. Hofkens organizis amuzan vesperon, lerte kaj sprite kunmetitan kaj kiu vere kreis gajan kaj amuzan atmosferon.

Jaŭdon, la 16an, laŭ invito de la universitataj studentoj, S-roj Maur. Jaŭmotte kaj Luc De Marré paroladis en Loveno por enkonduki novan Esperantan kurson.

La 17an, S-ro J. Jacobs paroladis pri « Jugoslavio », kiun li vizitis kun edzino. Helpe de multaj lumbildoj, li sukcesis doni al la aŭskultantoj kompletan ideon pri la vivo, la kutimoj kaj moroj de la popolo en la suda landparto. La paroladisto rakontis di-